## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 22-an de aŭgusto**

**speciale je la 18-a**

en la ĝardeno DORET

*aŭ se pluvos* :

ĉe Charlotte Blanc Maillard

Avenue Nestlé 7 en Vevey

021 922 34 74

la 5-an de septembro

ĉe Gilbert Darbellay

ch. de l'Orme 6 en Morrens

021 732 23 22

la 19-an de septembro

ĉe Monique Golaz

Ecole de Commerce 3 en Lausanne

021 646 42 78

## Proverbo

Ĉe tablo malplena, babilo ne fluas…

## Citaĵoj

Rememoru fundamentaĵon : Kapitalismo estas ekspluatado je homo fare de homo; sindikatismo estas ekzakte la malo.

Coluche

Ĉar riĉaĵo alvenas al ni dormante, tial ĝi tiel malrapidas.

Alphonse Allais




**Laŭzana Esperanto – Societo**

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

sekretario@eo-l.ch * ww.esperanto-lausanne.ch

Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43 Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Septembro 2014 – n° 7

Lunde, la 1-an de septembro 2014

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo

de la laŭzana stacidoma bufedo

**André Cherpillod prelegos**

al ni pri *ig* – *iĝ* – *po* - *um*

**Lunde la 6-an de oktobro**

*Esperantaj gramatikaĵoj kaj nialingvaj malfacilaĵoj.*

**Lunde la 3-an de novembro**

*Sébastien Moret parolos al ni pri esperantologio kaj lingvistiko.*

**Sabate, la 13-an de decembro**

*Zamenhofa Festo en la nova loko de USL en Ouchy.*

**Lunde la 5-an de januaro**

*Decidota*

**Lunde la 2-an de februaro**

*Ĝenerala asembleo ordinara*



# Jara ekskurso al *Arkeo de Noa* en Vicques (JU)

Sabate la 28-an de julio okazis nia kutima jara ekskurso. Je la 8-a la partoprenantoj rendevuis sur la autoparkejo « Vélodrome ». La vetero pli malpli belis, sed feliĉe ne pluvis.
Ni, la 13 fideluloj, enaŭtiĝis, direkte al Juraso. Ni decidis halti por kafumado en la Neuveville, borde de la neŭŝatela lago. Ni atingis nian elektitan celon, « la Arkeo de Noa », en Vicques apud Delémont, proksimume je la 11-a. Antaŭ la pordo 2 ĝirafoj kaj flanke 2 elefantoj – naturskalaj - atendis nin. Surloke Sinjoro Schneiter – la pajloŝtopisto - bonvenigis nin.
Nia gastiganto tuj klarigis, ke la vorto "pajloŝtopi" ne plu estas aktuala, ĉar nun en moderna tempo oni ne plu uzas pajlon sed kemian materialon, sorto de sekŝaŭmo, kiu estas pli facile uzebla. Hodiaŭ oni diras "naturigi – naturigisto". Li tre afable kaj pasie klarigis al ni pri siaj profesiaj teknikoj.



Post filmeto, kiu montras la artiston en faro, ni vizitis la ekspozicion – kreitan de li mem - kie troviĝas pli ol 2'500 bestoj el 5 kontinentoj. Mirigas nin sovaĝ- kaj farmbestoj, grandaj, malgrandaj ... neniu mankas. Ni promenadis tra la tuta "natura ensceniĝo", malkovrante familiojn de tigroj, lupoj, hienoj, blankaj kaj brunaj ursoj, rangiferoj, simioj, ktp. Eĉ unu buntkolora vestita Masajo, brutgardisto, aperis meze de la leonoj. En la ĉambro de la nekredeblaj kaj fabelaj bestoj, ankaŭ Harry Potter staris kun sia strigo "Hedviĝo" surŝultre.
Vere mirinda estas la multnombro de birdoj. Gigantaj, grandaj, malgrandaj, nigraj, brunaj, blankaj ĉeestas ... sed la plej mirindaj estas la papagoj buntaj kaj belkoloraj. Ĉiu el ni multe plezuris malkovri kaj rigardi tiun bestaron. Impresis nin la originaleco kaj la kvalito de la laboro de Sinjoro Schneiter por krei iluzion de vivo. Oni povas rimarki, ke li estas vera artisto, ĉar ĉiu besto montriĝas laŭ sia plej bela flanko.
Kun multe da steloj en la okuloj ni piknikis en iu ŝirmita loko, ĉar pluvis. Dum la reira vojo ni haltis en Bieno. Françoise Péterman, nia kasisto, kiu naskiĝis tiuregione, gvidis nin tra la malnova urbo, rimarkigante belajn placojn, stratetojn, domojn. Plezurigis al ni malkovri tiun urbon sub bela suno kaj blua ĉielo ... inter du pluveroj. Post lasta trinkaĵo ni adiaŭis antaŭ ol reveni hejmen. Estis vere ege simpatia etoso.
La organizantoj esperas, ke ĉiu el vi konservos bonan memoron de tiu ekskurso kaj dankas vin pro via ĉeesto. Bedaŭrinde la nealiĝintoj kaj senkulpiĝintoj ne povis profiti de tiu evento amika. Por la ekskurso 2015-a ĉiu povas proponi ideon.

Charlotte Blanc Maillard, vicprezidanto

